

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 516

OKTOBRO 1948

Se interesa romano plaças al vi, nepre legu la libron

MORTO DE TRAJNO

de FREEMAN WILLS CROFTS

El la angla lingvo tradukis

MASON STUTTARD

256 paĝoj. Bindita 9 ŝilingoj, aŭfranko 6p.

“Antaŭ ol mi komencis legi, mi timis, ke mi ne havos sufiĉe da persisto por tralegi libron, kiu neniom interesas min. La supozo montriĝis erara. Mi ne sentis emon formeti la libron, nur emis daŭrigi ĝis la fino, kaj mi nenion transsaltis. Sperto konfirmis tion, kion mi teorie konis de gravaj literaturistoj, kiuj defendas la detektivromanojn : ke detektivrakonto estas epika afero kun faktoj kaj agoj kaj kiu favorimpresas diferencas de multaj artpretendaj romanoj kun multpaĝaj priskriboj kaj aliaj trolongaĵoj, kiuj estas tute sensencaj, evidente faritaj nur por la kvanto. Mi supozas, ke tiu epika nivelo estas diversa ĉe diversaj aŭtoroj. Ankaŭ faktojn kaj agojn oni povas tiel prezenti ke la tuto fariĝas teda, senarta, ridinda. “Morto de Trajno” estas bonege verkita, kaj mi supozas, ke ĝi apartenas al la plej bonaj libroj de sia speco.”

Stellan Engholm en “Malgranda Revuo”.



Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Helpu Esperantan movadon de Kuba Insulo. Al geesperantistoj de ĉiuj mondpartoj ni, Kubaj Esperantistoj, petegas : sendu gratulajn leterojn aŭ kartojn al Universitato de Havano, ĉar tie oni instruas Esperanton en somera kurso. La adreso estas : D-ro José M. Gutierrez kaj D-ro Abelardo Moreno, Direktoroj, Escuela de Verano, Universidad de la Habana, Habana, Cuba, America Central.

Fr. Svačina, Lanžhot, Ĉeĥoslovakujo, koresp. kun tuta mondo pri jenaj temoj : (1) Bredado de senkornaj kaprinoj, laŭ plej moderna metodo. (2) Pri tuta homa vivo de naskiĝo, ne nur ĝis morto.

Ne-Katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

Filatelistoj el ĉiuj landoj ! Ĉu vi estas fervoraj kolek-tantoj ? Bonvolu peti informojn pri Madejra Filatela Klubo. Skribu multnombre al prez. : D-ro J. C. Tavares da Silva, Rua do Aljube, 49, Funchal, Madeira.

Tre deziras aĉeti kaj pagos malavare por ekzempleroj de unuaj esperantaj broŝuroj, jaroj 1887 ĝis 1892, Esperantista familio Chomette, 8525 Saturn Street, Los Angeles 35, Calif., Usono.

Letervespero-Ekspozicio 15 Decembro. Nepra respondo. S. Kövesdi, Tokodaltáró, Hungarujo.

Materialon por migranta ekspozicio ni bezonegas. Sendu broŝurojn, gazetojn, kartojn kaj ĉiujn aĵojn, kiuj taŭgas. Rekompence vi ricevos belan broŝuron pri Danlando. Centra Dana Esperantista Ligo, St. Blichersvej 43, Aabyhøj, Danlando.

Poŝtmarkojn, poŝtkartojn interŝanĝas Angle-Esperante, Lucio Marson, Cordenons (Udine), Italujo.

Ĉapelistoj tutmondaj. Mi deziras interŝanĝi leterojn kun alilandaj agemaj ĉapelistoj pri laboro kaj vivkondiĉoj en iliaj landoj. Bonvolu skribi al S-ro Juan F. Alchera, 25 de Mayo 70, Temperley, Argentino.

Fraŭlino Osmond, 16 West Street, Weston-super-Mare, Anglujo, deziras korespondi kun ĉiulandaj vegetaraj geesperantistoj. Ankaŭ aliaj. Certe respondos.

Karakterbildoj, klaraj kaj trafaj, pri vi, viaj amikoj, parencaj kaj kunlaboristoj laŭ manskribo. Sendu dek ĝis dudek linioj da inkskriba teksto kaj dudek du respondkuponojn al D-ro Bitterling, (20b) Göttingen, Schillerstr. 66, Germanujo. Tuja prilaboro. Respondo per aerpoŝto.

Propagandparolon mi faros antaŭ loka religia societo. Bonvolu sendi amase leterojn kaj poŝtkartojn por pruvi la universalecon de Esperanto. Antaŭdankon. S. Curran, Pickering, Yorkshire, Anglujo.

Tutmonda Katolika Adresaro, 1949—Kvara Jaro. Enskribo de nomo, adreso, aĝo, telefono, koresponddeziroj —du internaciajn respondkuponojn (kun senpaga ekzem- plero de la Adresaro). Limdato, 15 Decembro. Aperos la Januaro. Lorcán O hUiginn, Bóthar Glasárd 16, Dublin, Irlando.

Mi deziras korespondi kun gejunularo de ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. J. Mielcarek, Niemcewicz 5/15, Wrocław, Polujo. Respondoj estas garantiitaj.

S-ro Waclaw Belkowski, Zeromskiego 21, Radom, Polujo, librovendejo, deziras interŝanĝi polajn poŝtmarkojn kun seriozaj filatelistoj de la tuta mondo. Ne sendas unua.

Budhismo. Sendu unu int. rpk. por gazeto : Societo por Orienta Kulturo, Venavägen 49, Örebro, Svedujo.

Juna studento skolta deziras korespondi kun junaj geesperantistoj de tuta mondo : Froul Pičiuka, Olešvá p. p. Nové Mesto na Moravé, Ĉeĥoslovakujo.

Junularo : 15-jaraj lernantoj serĉas korespondantojn el la tuta mondo. S-ro W. Townend, Central High School, Leeds 2, Anglujo.

S-ro Alberto Diaz sciigas al siaj geamikoj ŝanĝon de adreso, nun : edf. Puente Victoria a. 10, Caracas, Venezuelo. Ankaŭ mi deziras korespondi pri abelkulturo.

Centoj da svedaj gejunuloj deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Vin turnu al I.A.P.K., Box 5085, Göteborg 5, Svedujo.

18-jara Nederlanda oficisto deziras korespondi kun ĉiuj landoj : Jo van Meel, Brugstraat 17, Eindhoven Nederlando.

Sendu kvanton da poŝtmarkoj de via lando kaj mi sendos saman kvanton. Herbert Levi, Esplanaden 21, Kalmar, Svedujo.

Deziras korespondi, interŝanĝi poŝtmarkojn, poŝtkartojn : S-ro R. Hamer (15-jara), B. de Roocklaan 12, Bergen-op-Zoom, Nederlando.

Letervespero la 25an de Oktobro. Skribu al S-ro Gersy, Contres (Loir-et-Cher), Francujo. Kompence vi ricevos belegan poŝtkarton.

Instruistino de surdmutuloj deziras korespondi kun samprofesiaj en aliaj landoj : S-ino Clark, 13 Elmwood Grove, Stockton-on-Tees, Anglujo.

Korespondas instruistoj kaj infanoj, kolektive aŭ individue. Jeanne Dedieu, 3 rue Arzac, Toulouse, Francujo.

"Nutril" kakao-kompozicio por maten- kaj posttag- manĝaĵo. Specimen-dozo kontraŭ 1 respondkupono. Esperanto Kultur-Servo, Jolsva u.4, Budapest III, Hungarujo.

S-ro Åke Magnusson, Brukskontoret, Nykroppa, Svedujo, 35-jara oficisto, deziras korespondi filatele.

S-ro Instruisto Malte Markheden, Hishult, Svedujo, deziras korespondi poŝtkarte aŭ letere.

Korespondi kaj interŝanĝi poŝtkartojn tutmonde deziras 25-jara verkmaĵstro Miroslav Budejicky, Františkov 190, Liberec, Ĉeĥoslovakujo.

Mi deziras korespondadi kun la tuta mondo pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Certe respondos. Skribu al Willi Nitsch, Rheingoldstrasse 33, (22a) Rheinhausen, Brita Zono, Germanujo.

ESPERANTA LEGOLIBRO

VILHO SETÄLÄ

Bindita 112 paĝoj

Prezo 2 ŝil. 6p., aŭfranko 4p. (11 rpk.)

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

41a JARO Oktobro 1948

N-ro 516 (10)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto :
H. HODLER

Redaktoro :
HANS JAKOB

Helpredaktoro
MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
Palais Wilson, Genève, Svis.

Ĉion pri administrado de UEA
kaj de la revuo ESPERANTO,
abonado, reklamoj, anoncetoj
sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth
Herts., Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj
(kun membreco kaj jarlibro
12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en
multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo - £5 anglaj
½ paĝo - 50 ŝil. anglaj
¼ paĝo - 25 ŝil. anglaj
⅛ paĝo - 12.5 ŝil. anglaj

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ
1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj

Legantoj en 65 landoj

ORIENTO KAJ OKCIDENTO

Kun sentoj miksitaj la mondo rigardas la evoluon de la situacio inter Oriento kaj Okcidento. Ni diru pli precize, la kreskon de la malfido inter la du blokoj ! Tri jarojn post la kapitulacio de la TRIA REGNO, la iama alianco, forĝita sub la minaco de la naziismo, disfalis. Jam oni parolas pri nova katastrofo ! Anstataŭ trovi rimedon malebligi ĝin, ĉiuj preparas sin por esti pretaj je ĉiu eventualeco.

Kiel oni klarigu al si tiun-ĉi situacion ? La simpla, ja tro simpla materialisma klarigo neniel kontentigas klarvidan homon. Ke la diverseco inter ekonomiaj fortoj kaj formoj, inter kapitalismo kaj komunismo kondukas al konfliktoj, pri tio neniue dubas. Ke ĉi tiu antagonismo *nur* povas esti forigata per milito, tion oni rajte pridubas.

Unu el la kialoj de la profunda abismo inter Oriento kaj Okcidento estas la malfido de la registaroj unu kontraŭ la alia. Ĉi tiu malfido regas ankaŭ inter la popoloj. La orientaj popoloj ne facile forgesas la ofte renkontitan malsaton flanke de la okcidentanoj, ofte konsiderantaj slavojn, balkan-anojn kaj azianojn kiel "subhomojn", minimume kiel ne-samvalorajn homojn. La orientanoj ne forgesas la insultojn direktitajn de certa gvidanto kontraŭ ili kaj la primitivspiritan klasifikon de "plenhomoj" kaj "subhomoj".

Estas konstatinde, ke la esperantista publiko entute simpatie rilatis kaj rilatas al orientaj popoloj, kaj la scio pri ili estas videble pli serioza kaj vasta ol ĉe la ne-esperantista publiko. Tio estas unu el la moralaj aktivoj de nia ideo, pruvante unu plian fojon la spiritan forton kiu disradias de Esperanto.

Kun vera ĉagreno la internacie pensantaj kaj sentantaj homoj konstatas pliprofundigon de la abismo inter la du partoj de la mondo. Kia devas esti ilia sinteno kontraŭ kalumnioj, kulpigoj kaj kondamnoj malavare disĵetataj de unu flanko al alia ? Kia estu la sinteno de ni Esperantistoj, efektivaj internaciuloj ?

Unue : Ni malfidu ĉiam ĝeneraligan informon ; ni malaprobu manieron prezenti unu flankon kiel nigran, la alian nurblankan.

Due : Ni vidu en ĉio nur la homon, tia kia li estas, laŭ siaj agoj, ne atentante devenon, politikan kredon, kaj mondpercepton.

Trie : Ni pensu ĉiam je la ŝanĝiĝemo de la politiko, kiu postulas hodiaŭ, ke ni bruligu tion, kion oni laŭdis hieraŭ. Ĝenerala regulo por ni Esperantistoj estas nia lingvo kaj ĝia progreso. Kie oni toleras ĝin, kie ni povas agi libere, tie estas nia patrolando. Tiel ni komprenas la sencon de la sentenco : *Ubi bene, ibi patria !*

La konkludon el tio ni lasas al vi legantoj !

H.J.

Edvardo Beneŝ

Vorto de danko anstataŭ nekrologo

Kiam oni presis la pasintan numeron (Septembro) la Radio informis pri la forpaso de Prezidanto Edvardo Beneŝ, la lok-tenanto de "T.G.M." Masaryk, kreinto de la Ĉeĥoslovaka respubliko. La taga gazetaro detale pritraktis la vivon de Doktoro Beneŝ, kiu deveninta el modesta kamparula medio ĉeĥa iris, dank' al fortaj kapabloj kaj talento sian vojon ĝis la plej alta rolo kiun demokrata popolo povas doni al unu el ĝiaj anoj.



Beneŝ estis distinga figuro de la epoko post la unua mondmilito. La filozofon sur la prezidanta seĝo T.G.M. kompletigis la plenumanto, D-ro Beneŝ, kiu eĉ en situacio ne-elirebla trovis formulon por alveni je io konkreta. Eŭropano en la vera senco de la vorto, Beneŝ estis arda defendanto de la kolektiva sekureco, kaj de la formulo "Paco per rajto".

Ni Esperantistoj kaj mondcivitanoj ŝuldas multan dankon al D-ro Beneŝ. Kiel ano de nacio kun lingvo ne uzata internacie, li komprenis la nepran utilon de simpla idiomato por la internaciaj rilatoj. Li mem poligloto, flue uzante krom sian lingvon, la anglan, francan, germanan kaj rusan, spertis kion signifas la lingva diverseco. Kaj el ĉi tiu praktika kompreno li uzis sian influon por

akceli la demandojn pri internacia lingvo. Li subskribis (1920) kun naŭ aliaj delegitoj registaraj la faman rezolucion, kiu invitis la Ligon de Nacioj informi pri Esperanto, kio kondukis rekte al la diskutado de la tuta problemo. "Ho ve," same kiel Prezidanto Beneŝ konatiĝis kun la supro kaj malsupro de la vivo, la relativeco de ĉio tera, ankaŭ ni Esperantistoj lernis, ke ne sufiĉas deklaroj, rekomendoj kaj gratuloj por vivteni ion, sed la konstanta defendado de idealo per ĉiuj. Prezidanto Beneŝ restas en la memoro de la ĉeĥoslovaka popolo kiel la forĝisto de la nacia sendependeco kaj ĉe la Esperantistoj kiel unu el la unuaj ŝtatviroj de la Nova Eŭropo, kiu komprenis ke unueca Eŭropo bezonas unuecigan lingvon. Liaj idealoj staras hodiaŭ en la defensivo sed ili triumfos morgaŭ. La devizo de la ĉeĥoslovaka respubliko "Verde venkos" ne perdis sian valoron.

Georges Agricola

Libelo kaj formiko

Fablo de Krilov

Iu saltulin', libelo,
Kantis dum somero bela
Kaj rimarki ne prosperis,
Kiam vintro jam aperis.

Verdaj kampoj iĝis grizaj,
Pasis tagoj paradizaj ;
Ne sub ĉiu folieto
Manĝ' kaj lito estis preta.

La libelo jam silentas
Ĉar malsato ĝin turmentas ;
Jam libelo ne festenas ;
Al najbar', formiko, venas :

"Ho, ne lasu min, amiko,
Sed konservu min fortika
Kaj nur ĝis printempo ĉarma
Tenu sata min kaj varma !"

"Amikin', ĉu vi petolas ?"
La formik' al ĝi parolas :
"Tio min mirigas, vere.
Ĉu laboris vi somere ?"

"Kiel do labori, kara ?
Sur herb' mola en arbaro
Ne libeloj kantis, dancis,
Kapojn tordis kaj balancis . . ."

"Do, vi . . . ?"—"Kantis mi someron,
Okupita estis ĉiom."
"Kantis ? . . . Vidu la aferon !
Iru nun kaj . . . dancu iom !"

El la rusa tradukis M. Soloviev

Georges Agricola :

LA TRANSSKRIBO EN ESPERANTON DE PERSONAJ NOMOJ

La transskribo de personaj nomoj estas unu el la komplikaj problemoj de nia lingvo. Malgraŭ ke aperis jam kelkaj studoj pri ĉi-tiu flanko de la vortaro, ekzistas tamen ia malcerteco pri la maniero plej trafa, transskribi propran nomon. Konvenas do, foje trakti tiun ĉi problemon antaŭ plivasta publiko, despli ke multe da novaj adeptoj entute ne konas tion, kio jam estas skribita pri ĉi tiu problemo.

Ekzistas du grupoj da nomoj, kiuj kelkfoje prezentas ioman embarason por internaci-lingvano. La unua grupo estas la geografiaj nomoj, la vasta esprimaro, per kiu la nomdoninta homo penadis memorfiksi por si kaj aliaj la spacon, kiun li honoras per sia ĉeesto. La dua nomgrupo estas la personaj nomoj, pri kiuj informas en libera formo la nuna artikolo.

Persona nomo.

Kio estas persona nomo? Nu, la respondo ŝajnas simpla! Ĝi estas nenio alia ol ombro, kiu akompanas la homon! Sen nomo oni ja ne povas imagi al si homan estaĵon, floron de la arbo de la homaro. Kaj por esti plej preciza, kaj ne erari, la homa spirito jam frue trovis solvon de la problemeto, distingiĝi unu de la alia. La eŭropa kutimo, posedi du nomojn ne estas io tipa, io specife grandioza; sed ĝi estas ĉiuokaze la plej praktika maniero, diferencigi la homojn. Persona nomo estas duspeca. La ĉefa estas la familia, tiu kiun la infano kvazaŭ heredis kaj la dua, tiu kiun la feliĉaj gepatroj difinis por la infano. La gepatroj donis ĝin kaj tie komenciĝas la tragikomedio. Ĉar konvenas nur la plej bela, la plej signifa, la plej trafa nomo por la kara ido! Doni nomon estis en frua tempo de la homaro kaj kelkfoje ankoraŭ nun en nia poezimanka epoko, grava problemo, kiu igis cerbumi gepatrojn kaj parencojn. Vi komprenas nun, pri kio temas, ĉu ne? Jes, pri la baptonomo aŭ antaŭnomo temas do! Ambaŭ esprimoj ne estas tute precizaj, sed la ĝenerala uzado ilin sankciis. Antaŭnomo por hungaro ekzemple, kiel por kelkaj aliaj popoloj estas precize la familia nomo kaj la baptonomo sekvas ĝin. Kaj por nekristano la vorto "baptonomo" ankaŭ ne estas konvena. Ĉar la familia nomo estas io firma kaj antaŭnomo io dependa, la esprimo *voknomo* (la nomo per kiu la gepatroj vokas la infanon) estas pli preciza. La antikvaj Romanoj konis tri ĝis kvar specojn de nomo: Antaŭnomon (praenomen), gento-nomon (nomen gentile), familian nomon (cognomen).

Romano distingiĝinta ricevis aŭ mem donis al si plian nomon. (ignomen). Kutimo ankoraŭ praktikata en kelkaj landoj dum nuna tempo. (Kamal Atatürk: alnomo "Gazi").

Familia nomo, io tre specifa, ne estas tradukata, almenaŭ ne ĝenerale. Se *Johann Schmied* aŭ iu *Kovács János* elmigras Usonon kaj fariĝas civitanoj, ili ŝanĝas siajn Johann aŭ János en *John*: sed, ke Schmied aŭ Kovács iĝu *Smith* jam estas alia afero. Vi rimarkas jam la diferencon, ĉu ne? Kvankam Smith estas tute la sama ideo, ĝi tamen estas io ne tuŝebla, kiam temas pri familia nomo, firma roko en la maro de la nomoj. Kelkfoje tamen, per aŭtoritata decido, oni rajtas ŝanĝi sian familian nomon, ĝin tradukante. Ekzistas eĉ tiaj en Esperanto.

Konkludo: tradukebla (kaj transskribebla) estas senescepte nur la voknomo.

Klasigo de voknomoj.

La homa spirito ĉie serĉis ordigi, klasigi, registri: nenio miriga, ke jam frue scienculoj kaj laikoj interesiĝis pri tiu "io", la nomo.

Kaj sennombraj estas la verkoj pri la nomoj. Por nia celo sufiĉas koni la principajn kategoriojn de voknomoj, rilate al ilia taŭgeco por transskribi ilin en Esperanton. Tion farante ni havas tri grupojn tre precize distingeblajn:

- (1) Historiaj antikvaj nomoj ofte malsamformaj, en naciaj lingvoj.
- (2) Modernaj internaciaj nomoj el diversaj fontoj, kelkfoje tradukataj, plejofte nur transskribataj.
- (3) Ne tradukeblaj kaj ne transskribeblaj nomoj. Historiaj nomoj, asiriaj, babilonaj, hebreaĵ, feniciaj, egiptaj, grekaj, keltaj, latinaj, malnovnordaj, germanaj, malnovslavaj kaj tiel plu, ĝenerale estas konservataj en sia origina formo. Ofte oni havas du formojn, ekzemple la reĝnomon Nabu-kudduri-Ussur, el kiu la hebreoj kaj grekoj formis la por ni tuj konatajn Nebukadnecar aŭ Nabuchodonosor.

Inter la historiaj nomoj ekzistas kelkaj, kiuj tradukitaj eniris aliajn lingvojn; la plej stranga detalo estas, ke oni vice uzas ilin, malkonante samsignifecon. Sekve en Esperanto oni ne tradukas nomon: Salome, Irene, Friederike, (Frieda) Miroslava, Paz per paco aŭ laŭvorte "Paco-riĉa". Alia ekzemplo: Esther, Stella=Stelo.

Kristaliĝas dua regulo: Ne traduku en Esperanton voknomon, se tiu ĉi esprimas ideon ĝeneralan.

Modernaj vokonomoj (internaciaj nomoj) estas transskribataj. Ĉefa grupo estas la bibliaj, plej disvastigita kun ŝanĝanta ortografio en la naciaj lingvoj. Ne ĉiuj bibliaj nomoj estas internacie uzataj aŭ penetris en la uzadon de nehebreaj popoloj. Kelkaj tiaj nomoj eniris modernajn lingvojn naciajn en la origina formo kaj ankaŭ tradukite laŭ la senco. La transskribo en Esperanto okazas per simpla adapto al la esperanta ortografio ekz. Abrahamo, Absalono, Adamo, Ahasvero, Barnabo, Danielo, Efraimo, k.t.p. La plimulto de la bibliaj nomoj hebreaj penetris en eŭropajn lingvojn trans la grekan; malofte la formo origina estas konservita fidele.

Kelkaj voknomoj el biblia deveno ŝanĝis ortografion en la naciaj lingvoj, tiel ke oni devis elekti por Esperanto formon plej proksiman kaj adekvatan, ekzemple: Johano formita laŭ la grek-germana Ioannes-Johann por esti la ekvivalento de Jechohanan, la origina formo hebrea kaj ĝiaj fratoj en la naciaj lingvoj: Jan, Janis, Janos, Jean, Joan, Joanes, John, Juan, Jonež, Ivan, Giovanni k.t.p. kaj Jozefo por Joseph, José, Jože, Giuseppe, Ossip k.t.p.

Sed inter la bibliaj nomoj estas iuj, malpli ofte uzataj, pri kies transskribo oni ŝanceliĝas. Citindaj estas: Ezechiël-Hesekiel: Hiob, Job: Zefanja-Cefanjaha: Eleazar - Elieser - Lazarus - Lejzer - Lazaro.

Bibliaj nomoj estas transskribataj atentante originan formon hebrean (aramean) kaj la plej proksiman formon ortografian en naciaj lingvoj.

La dua parto de la voknomoj internacie uzataj devenas de pluraj fontoj. Ekzemple tiaj de Franka. Voknomo eŭropa, eternigita per la Franka reĝo Karlo Granda (Carolus Magnus, Charlemagne). La formo Karlo popularigita per la Privat'a verketo, tamen ne respondas al nepra internacieco. Pli bonforma estas Karolo, precipe pro la virina forma *Karolino* diskutota pli poste. El ĉi tiu grupo de alemana, gota, franka, saksa, teŭta kaj vandala deveno tre multaj eniris aliajn lingvojn. Ni memoru nur la belan nomon *Rodrigo*, tute hispanaspektan: tamen ĝi estas de vandala ĝermana fonto: Roderich.

Alia voknomo el ĉi tiu grupo kun ne malpli granda disvastiĝo kaj famo estas Vilhelmo. Ĝi estas kun Johano eble la plej internacia, ne ŝanĝante multe la aspekton: por nura kompreno ni vidu la liston: origina formo germana = Wilhelm. La nomo aperas por multaj kiel unu-idea. Fakte ĝi estas kompozito (kunigaĵo) de du, kiel klare evidentigas la norda formo Wilhjamr, t.e. Kasko de Wilis. Kaj la serio aspektas jene: William, Guillaume, Guglielmo, Willem, Wilm, Wilhelmus, Wilém, Vilim, Vilmos.

Grekaĵ nomoj kristanaj ne estu malatentataj. Unu el ili, tre konata inter Esperantistoj pro famaj pioniroj Cart kaj Rousseau estas Théophile. Ĝi estas elokventa pruvo pri la internacieco de la ideoj. Kiu rilatigus ĉi tiun nomon kun Abrahamo? Abrahamo havis la honoran titolon "Amiko de Dio" kaj ankoraŭ nun la Islamanoj uzas ĉi tiun titolon (El-Khalil). Nu, ĉi tiu titolo tradukita en greka lingvo estas Théophile! La ekvivalento latina estas *Amadeus*, itale *Amadeo*, kaj denove franca formo *Amédée*. La slavo uzas *Bogumil* en sama senco kaj eble la germana "Gottlieb" naskiĝis el sama ideo, kvankam etimologie ĝi signifas "filo de Dio". En Esperanto ni havus tiam du formojn: Teofilo, Amadeo. La voknomoj internaciaj de grek-latina origino estas multnombraj. Esperanto pro ĝia karaktero latinida akceptas do kiel transskribon propran, Teofilo kaj Amadeo. Tradukoj de ĉi tiu nomo en aliaj lingvoj (Bogumil, Godwin, Gottlieb (?) k.a.) ne ŝanĝas formon.

Kelkaj similaj nomoj estas:

Timoteo = Timo antaŭ Dio aŭ Diotimo, Eusebio; Pio = Piulo; Teodulo = Diservanto; Teodoro = Didonaĵo, Diodono (Devadatta, Deusdedit, Diodati, Dieudonné, Jonathan, Mathäus, Mathieu, Mateo, Bohumil, Nathaniel). Samidea estas Herodot, Izidoro kaj Artemidoro, imitaĵo de Teodoro (Didonaĵo) kaj signifantaj "Dono de Hera", "Dono de Isis", "Dono de Artemis". Rezultas nova regulo, la kvara:—

Povas esti transskribataj en Esperanton kun la propra karaktero de la lingvo, la nomoj el grek-latina origino.

Ne transskribeblaj nomoj.

Nekalkulebla kiel la sablo ĉe la marbordo estas la nombro de la voknomoj propraj al ĉiu popolo. La esplorado pri origino, kaŭzo kaj signifo de voknomo estas unu el la plej ĉarmaj studobjektoj, kiu egale tuŝas folkloron, geografion, historion, religion kaj aliajn branĉojn de la homo sciado. Kaj ne rimarkeble por profana vido pasas ideoj ligiloj de nomoj de unu lingvo al alia, de unu gento al alia. Sama estas la ĝojo ĉe ĉiu, okaze de alveno de ido, same oni ĉie serĉas ion apartan aŭ karakterizan kaj identa estas la rezultato: la trovo de nomo konforma al gepatra deziro (aŭ kaprico) kun bonvola kunhelpo de ceteraj familianoj.

Same kiel oni ne transskribas tiajn *tipajn voknomojn* en alian popolan lingvon, oni ankaŭ ne faras en Esperanto.

La nomoj ne transskribeblaj entute (aŭ parte) formas la plimulton. Kaj ilin oni skribas kiel oni ilin skribas ĉe la koncerna popolo. Tio ŝajnas nun tute simple. Ĝi ne estas tiel, pro jena kaŭzo. Plej ofte ni vidas tiajn nomojn, ekzemple

orientajn, arabajn, ĉinajn, iranajn, hindajn, japanajn, mongolajn en fremda transskribo, malperfekte donantaj en latinlitera ortografio la proksimuman ekvivalenton.

Estas la tasko de la estontaj kompilantoj de persona nom-vortaro, elekti la taŭgan formon por nia lingvo, kunigante formon kaj prononcon de la origino kun la esperanta ortografio.

Por belsoneco, oni substantivigu ĝin, aldonante finaĵon "o".

Kvina regulo: Nomojn ne transskribeblajn uzu en la formo *propra de la origino, uzante internacian ortografion*.

Virinaj nomoj.

La ĝisnuna teksto traktis nur pri voknomoj de la forta sekso. Tio ne estas ĝentila kontraŭ virinoj; sed same kiel Evo sekvis Adamon, ankaŭ la virina nomo sekvas la viran. Almenaŭ en la plej multaj kazoj. Kiel ni traktu la voknomojn de la bela parto de la homaro? Jen stariĝas akademia problemo, inda je la cerbumado de la saĝuloj. Ankaŭ tiurilate ni observu unue kiel procedas la popolaj lingvoj. Kaj komenciĝas interesa ĉapitro en la granda neskribita universala nomvortaro.

La plimulto de la nomoj en la popolaj lingvoj havas ekvivalenton virinan. La nur-virinaj voknomoj, do ne derivataj el nomoj viraj, formas malpli grandan nombron. En ĉiuj indoaraj lingvoj la derivataj nomoj estas kreitaj per aldono de litero **a** aŭ **e**, aŭ per sufikso, analoga al nia "in". Ofte la sufikso estas diminutivo karesa kiel tio decas ĉe nomo de virino. Ekzemploj: Francisco, Francesca, René, Renée, Jules, Juliette, Henri, Henriette, Charles, Charlotte, Jean, Jeanette.

Kiel ni nun transskribu virinan nomon? Unu grupo estas simpla. Tio estas la bibliaj nomoj nur-virinaj, ĝeneraligitaj en eŭropaj landoj. Ekzemple: Mario, Elizabeto, Magdaleno. Nenion oni bezonas diri pri ili. Jam komplikiĝas la afero pro certaj nomspecoj, ĉe kiuj la simpla substantivigo per "o" donas ne-kutiman vortbildon. Vidu: Saro, Rebeko, Judito, Marto, k.t.p. Ĉe tiaj nomoj oni simple sekvas la plej konatan formon aŭ la uzmanieron de D-ro Zamenhof en la Biblio. La simpla esperantigo per "o" ĝenas kelkfoje pro derivado de vira nomo el virina, okazo tre malofta. Vidu nomon Mario, kiu estas samtempe la esp. formo por Marius (tiom kara al Marsej'anoj!) kaj Mario, la formo itala.

Restas tamen bona nombro da voknomoj, ĉe kiuj la aldono "in" estas tuta bona. Oni devas nur sisteme uzi por kutimiĝi je ĝi. Ekzemploj: Albertino, Antonino, Ernestino, Franciskino, Frederikino, Georgino, Johanino, Henrikino,

Karolino, Ludovikino, Marcelino, Modestino (atentu: ne modistino!) Nikolino, Oktavino, Paŭlino, Rikardino, Stefanino, Teodorino, Ulrikino, Viktorino, Zenobino.

Sesa regulo: Virina voknomo povas esti transskribata per aldono de "o" aŭ per "in".

Voknomoj esperantaj.

Nenio ilustras plibone la altir-povon de nia lingvo kaj movado, la fortan impreson kiun ĝi kreas sur la animo ol la multaj aperaĵoj de sentimentaleco kaj de flama fervoro. Inter ĉi tiuj aperaĵoj, kiuj kiel tutaĵo formas interesan laborkampon de psikanalizado, estas ankaŭ la fakto de la ekzisto de propraj voknomoj en Esperanto. Precize: de voknomoj kreitaj rekte el Esperanta vortmaterialo, ĉu imitante naci-lingvan voknomon, ĝin rekte tradukante en Esperanto, ĉu serĉante ion novan. Kiel nomoj tradukitaj laŭ la senco tute bonformaj kaj belaspektaj en nia lingvo ni citu kiel ekzemplojn: Diodono, Diotimo, Diofilo

Atentema leganto de esp. gazetoj povis renkonti nomojn uzatajn, do akceptitajn de la aŭtoritatoj: Etulino, Milda, Benita, Aminda, Glora, Gracia, Esperantina.

Ĉi tiuj formas la duan grupon de efektivaj voknomoj esperantaj. Oni vidas, ke la adjektiva formo, ĉar sentita kiel virina, superas aliajn. Oni rajtas supozi, ke en la estonto tiaj esperantaj voknomoj plimultiĝos. Ĝis nun ne ekzistas verko, kiu traktas laŭ scienca maniero la voknomojn de eŭropaj popoloj, ilin klasigante kaj komparante. Ekzistas tiaj verkoj, kiuj traktas nur partojn, mankas universala verko, kiu ne haltas ĉe niaj ĉefaj lingvoj, sed esploras ankaŭ la trezorojn de la malgrandaj popoloj. Je tia verko povus kunhelpi esperantistoj, precipe anoj de "malplimulto - lingvoj" kompilante el propra lingvo la voknomojn. Ĉarma kaj alloga estas ĉi tiu studado pri senco kaj signifo de la nomoj kaj oni komprenas tiam la latinan citaĵon: *Nomen est omen*.

GRAVA ALVOKO


Sendu saluton al la Landa Sindikata Kongreso, kiu okazos en Budapeŝto, Hungarujo (adreso: VIII, Fiumei ut.4.a.) la 17-20 de Oktobro. Partoprenos reprezentantoj de la sindikatoj de 20 nacioj, inter ili Saillaut, ĉefsekretario de la Sindikata Mondligo. Proponu, kaj per vialandaj reprezentantoj proponigu, la alprenon de Esperanto **apud** aliaj lingvoj por plifaciligi la solidaran kunlaboron de la sindikatmembroj. Sendu ekspozician materialon pri uzo de Esperanto ĉe sindikatoj.

P.B.

TRA LA MONDO ESPERANTISTA

La somera sezono estas malriĉa je esperantistaj okazintaĵoj lokaj aŭ landaj. Ne, aŭ nur malmulte, funkcias kursoj, ĉefa elemento de esperantista agado. Kontraŭe floras la internacia vivo, renkontiĝoj esperantistaj, kaj inter ili la ĉefa, la jara kongreso tutmonda.

La pasinta printempo-somero vidis aron da landaj kongresoj, ĉiuj bone vizititaj. Inter ili speciale rimarkinda estis la germana en München. Ĉi tiu kongreso ĉe kiu partoprenis granda nombro da eksterlandaj esperantistoj signas la rekomen-
ciĝon de la movado kaj estas kuraĝiga fakto, ke malgraŭ ĉiuj tedaĵoj de la nuna vivo en Germanujo, niaj samideanoj decide rekonstruas. La urbo München - ja havas specialan signifon. Sub la Hitlera reĝimo ĝi portis la titolon "*ĉefurbo de la movado*", ĉar tie komenciĝis la konkero de Germanujo flanko de la naciistoj. Hodiaŭ oni povas nomi München la "**ĉefurbo de la Esperanto-Movado en Germanujo**". Venontjare la germana landa kongreso okazos en Göttingen (brita zono) "urbo fama pro siaj kolbasoj kaj universitato", kiel diras Heine en la "Harc-vojaĝo".




D-ro Pitlik instruante.

De Hungarujo ni ricevis longegan raporton kun multaj detaletoj pri la Danubvala Esperanto-Konferenco en Budapeŝto. Ĝin partoprenis samideanoj el Aŭstrujo, Ĉeĥoslovakujo, Bulgarujo kaj Jugoslavujo kaj kelkcent hungaroj. Atentinde estas, ke ankaŭ sub ŝanĝitaj cirkonstancoj, la publikaj povoj daŭrigas sian intereson al nia afero kiel pravas la partopreno de reprezentanto de la Hungara registaro, ŝtata sekretario, Ivan Boldizsár. Inter la diversaj manifestacioj (ĉu necesas eĉ akcenti tion!) brilis la jam bone konataj hungaraj artistoj, pianisto Ungár kaj la kvarteto de Biró, la talentaj radiomuzikantoj. Sed la tuton kronis la vizito de la gvidantoj ĉe Ministro-prezidanto Dinnyés kaj la estroj de la ĉefaj politikaj partioj. En la laborkunsidoj oni preparolis U.E.A. aferojn, akcentante la nepran demokratecon kaj kontraŭfaŝismon de nia internacia organizaĵo! Estis decidite; la kreo de Danubregiona Agadkomitato (centro en Sofia) kaj rekomendite subteni la revuojn *Internacia Kulturo* kaj *Literatura Mondo*. Resume: Tre bone sukcesinta manifestacio.

Jam estas tradicio en ĉeĥoslovaka movado kunveni dum somero en Doksy. La trian fojon, ĉeĥoslovakaj esperantistoj renkontiĝis en Somera Esperanto-Lernejo (17 ĝis 31 Julio). En tri kursoj partoprenis 200 lernantoj el 50 lokoj. La Somer-lernejon gvidis nia pioniro D-ro Pitlik helpita de ok instruistoj. Okazis ekzamenoj

superaj. Kaj ne mankis amuzaĵoj, ekskursoj, banado, remado en Mácha Lago, teatro, dancado, muzik- kaj artvespero (por kio en landoj apud danubaj oni uzas la nekutiman vorton Akademio!) je honoro de D-ro Pitlik, atinginta 65 jarojn. Kulmina punkto estis la bapto de strato je la nomo ESPERANTO, laŭ decido de la urba estraro. Entute bonege aranĝita kaj brile sukcesinta manifestacio.

Bonega propagando (kaj relative ne multekosta) estas Esperanto-stando en lokaj regionaj foiroj.



Esperanto en la foiro de Angers (F-ino Nouais kaj S-ro Fouski organizintoj de la stando).

Pri unu tia okazinta en Angers, Francujo, de la 27.5 ĝis 6.6.48, venis konciza raporto laŭ kiu la stando organizita de la lokaj samideanoj havis grandan sukceson. Pli ol ducentmil personoj vizitis la foiron kaj preterpasis la Esp. standon kaj estis disdonitaj sesmil propagandiloj. La junularon precipe altiris la lerte aranĝitaj kovertoj kun poŝtmarkoj ĉiulandaj, montrantaj la disvastiĝon de nia lingvo.

Post la universala kongreso en Malmö, okazis pluraj kunvenoj, unu el ili en Norvegujo. De la 10-17-a de Aŭgusto kolektiĝis 55 pacaj batalantoj el 9 landoj en Lofthus, Hardanger (Norvegujo), kie eksterlandanoj kaj norvegoj plene ĝuis belan naturon kaj esperantistan amikecon. Interesaj ekskursoj al la montoj, al granda akvofalo kaj sur la fama Hardangerfjordo. Vespere kunesto en la granda salono en la lernejo kun interesaj paroladoj, diskuto de aktualaj temoj, amuzado kaj ludado, popoldancoj laŭ norvega popolmuziko. Ĉe la bela malnova preĝejo oni rigardis "Hardanger-geedziĝon", kie la fianĉino portas malnovan kronon, ĉiuj gastoj la nacian kostumon, kaj la ludisto venas unua, ludante per sia "Hardanger-violono". Ne forgesblaj tagoj en plena harmonio.

En malproksima pasinto de nia movado, kiam oni ankoraŭ ne povis paroli pri movado, la renkontiĝo kun fremda esperantisto estis okazaĵo salutita kiel festo de niaj pioniroj. Io simila ekzistas ankoraŭ en transmaraj landoj, kie eŭropa samideano, malgraŭ la enmigrado de miloj da rifuĝintoj eŭropaj, estas ia unikaĵo. Nia samideano Dragutin Wranka, konata pro siaj karikaturoj desegnaĵoj alvenis post dumonata vojaĝo al Brazilo kaj haltis en Rio de Janeiro kaj Santos. Li profitis tiun ĉi restadon por fari tri prelegojn kun provlecio laŭ la Cseh metodo, entuziasme akceptita de la partoprenantoj. Lia vojaĝo lin kondukis al Buenos Aires kaj Santiago (Ĉilio) por atingi la plej sudan lokon, nome Punta Arenas, kie li intencas resti.

T.J.O. Internacia Kunveno

La 4-a Internacia Kunveno de la Tutmonda Junular-Organizo, en kiu partoprenis 300 personoj el 9 landoj, okazis en Groet, Nederlando Aŭguston 5-11.

La sekretario raportis, ke T.J.O. nun havas 1600 membrojn en 20 landoj. En fakkunsido de Esperantistaj instruistoj oni unuanime aprobis la jenan rezolucion:

"La Esperantistaj instruistoj partoprenantaj en la Internacia Kunveno de T.J.O. en Nederlando, en fakkunsido okazinta la 9-an de Aŭgusto esprimas la opinion, ke la tempo jam venis por

organizi la Esperantistajn instruistojn en ĉiuj landoj kun la celo enkonduki Esperanton kiel devigan temon en la lernejojn de la tuta mondo."

Oni decidis sendi ekzemplerojn de la rezolucio al ĉiuj landaj asocioj, kie ekzistas fako por instruistoj.

Oni esperas okazigi la 5-an Internacian Kunvenon en Versailles, Francujo en 1949.

F.P.

Nova Opinio-kontrolo pri Esperanto

Laŭ la Nederlanda ĵurnalo *Het Rotterdamsch Parool* la Nederlanda Instituto por la Publika Opinio antaŭ nelonge demandis la Nederlandan publikon:

"Se lingvo devus esti mondlingvo, do en ĉiuj landoj kiel dua lingvo devus esti lernata krom la propra lingvo, kiu lingvo laŭ via opinio devus esti tiu lingvo?"

Jen la respondoj: Angla 38%, Esperanto 29%, Franca 2%, Germana 2%, Rusa 1%, aliaj lingvoj 1%, 27% ne havis opinion.

Ĉe la rezultato estas frapante, ke la malpli bonstataj homoj kaj tiuj kiuj ne povis havi multan instruadon pli ŝatas Esperanton kiel mondlingvon ol la Anglan. Tion montras jena tabelo:

	Angla	Esperanto
Homoj kun plej malalta salajro:	20%	29%
„ „ „ malalta „	41%	33%
„ „ „ mezgrada „	55%	22%
„ „ „ alta „	47%	27%
Homoj kun nur elementa instruado	24%	31%
„ „ „ unuagrada „	51%	31%
„ „ „ mezgrada „	59%	23%
„ „ „ altlerneja „	55%	17%

Pri ĉi tiu rezulto ni povas ricevi iom da kontento. Esperanto ja atingis la duan lokon. La diferenco estas negranda kaj se ĉiu faros sian devon, ni baldaŭ hisos la verdan standardon por signi la venkon.

J. D. Brakel

Hungara Esperantisto fariĝis ministro!

S-ro István M. Kossa, kiu jam antaŭ la mondmilito partoprenis en la hungara laborista Esperanto-movado—eĉ gvidis tramistan grupon—kaj post la milito en 1945-1947 estis prezidanto de HESL, estis nomata la 6-an de Aŭgusto Ministro de Industrio. Li estas en la gvidantaro de la Hungara Laborista Partio, kaj antaŭe gvidis la Hungaran Sindikatan Centron.

FAKKUNSIDOJ EN MALMO

I.I.K. (Int. Instruista Kunlaboro)

S-ro E. Dahl malfermis la kunsidon, kiun partoprenis proksimume 80 geinstruistoj el 13 landoj. F-ino M. Jay, Britujo, prezidis. Oni ekzamenis la laboron faritan post la Berna kongreso kaj konstatis, ke la laboro sur la lerneja kampo iom post iom pliampleksiĝas. Raportojn faris F-ino Nixon pri agado en Britujo, kaj F-ino Dedieu pri Francujo. Post diskuto, S-ro Dahl skizis la agadplanon por la estonteco kaj la ĉeestantoj aprobis la decidojn pri plifirmigo de la tasko enigi Esperanton en la lernejojn.

I.K.E.L. (Int. Koopera Esp. Ligo)

I.K.E.L. elektis kiel plenuman komitaton la kooperan sektion de Sveda Esperanto-Federacio. La kunveno decidis sendi leteron al la Kooperativa Alianco kun proponoj, ke la Alianco subtenu la esperanto-movadon.

I.K.U.E. (Int. Katolika Unuiĝo Esp.)

Partoprenis reprezentantoj el 7 landoj. Post la preĝo la Vic-prezidanto pastro A. Beckers donis raporton pri la ĉiam kreskanta evoluo de I.K.U.E. Kaŭze de la milito oni perdis ĉion, sed kun la valora helpo de la sekretario, S-ro de Jong en Nederlando, oni reorganizis kaj ekeldonis la ĉiumonatan revuon *Espero Katolika*. En 1947 oni havis duoblon de la membroj en antaŭmilita tempo kaj jam en 1948 oni atingis trioblon. La kunsido decidis rezolucion, ke la Estraro de U.E.A. okazigu la 1950-an U.K. en Romo.

I.S.A.E. (Int. Scienca Asocio Esp.)

Okazis du kunsidoj kun prezido de S-ro Støp-Bowitz. La ĝenerala sekretario letere raportis, ke en aprilo la asocio havis 168 membrojn kaj ke la Brita kaj Nederlanda sciencaj societoj havis proks. 180.

La ĉeestantoj vigle diskutis la statuton kaj provizore aprobis ĝin. Grava ŝanĝo estis, ke la kongresaj kunsidoj ne havas decidpovon, sed faras nur konsilojn, kiujn, se necese, la membroj povas aprobi per referendumo. La gvidado estas duparta: la Komitato de delegitoj de ĉiuj landoj, kaj la Estraro de 4 personoj.

La sekretario raportis, ke li devas ekŝi pro militservo kaj la Kunveno elektis S-ron S. Alexandersson, Ulricehamnsvägen 16, Hammarbyhöjden, Svedujo kiel sekretarion.

La prezidanto raportis, ke organo certe aperos en la aŭtuno kun titolo *Scienca Revuo*. La Brita societo eldonas Esperantlingvan gazeton *Scienco kaj Tekniko*.

T.E.J.A. (Tutmonda Esp. Ĵurnalista Asocio)

Partoprenis 25 personoj el 9 landoj. La kunvenintoj aprobis la agadon dum la pasinta

ĵaro. La sekretario raportis, ke la asocio jam havas 94 membrojn en 32 landoj, el kiuj la plimulto estas aktivaj ĵurnalistoj. Oni aŭdis raportojn, interalie, el Ĉeĥoslovakujo kaj Islando.

La kunveno decidis kelkajn ŝanĝojn en la statuto, ekz. eron kiu ebligas al radio-redaktoroj kaj radio-laborantaj esperantistoj fondi radian sektion.

Prezidanto de T.E.J.A. estas ĉefredaktoro Carl H. Johanson, Linköping, kaj la sekretario Redaktoro E. Adamson, Göteborg, ambaŭ en Svedujo.

T.E.K.A. (Tutmonda Esp. Kuracista Asocio)

La kunsido decidis:

(1) peti la naciajn Esperanto-asociojn sciigi la nomojn de Esperante parolantaj kuracistoj, apotekistoj, flegistoj k.s. por la kompilo de kompleta adresaro;

(2) reorganizi sian organizaĵon pere de bona centra administracio;

(3) varbadi novajn membrojn per Esperanto-kursoj kaj nacilingvaj prelegoj en fakaj rondoj;

(4) se ne estos eble eldoni propran organon, uzi la organon de I.S.A.E. kiel informilon.

U.L. (Universala Ligo)

Dum la kongreso alvenis la grava sciigo, ke la Mondmovado por Federacia Mondregistaro, kun sidejo en Genevo, akceptis Esperanton. La sekvo estas, ke oni de nun rajtas paroli la Internacian Lingvon en la kunsidoj de la Federalisma Mondmovado, kondiĉe ke iu traduku la parolon en la anglan aŭ francan lingvon. Apenaŭ estas necese emfazi la gravon de tiu decido, kiu montras la komprenemon kaj ŝaton por Esperanto, kaj Esperantistoj devas eluzi tiun okazon por paroli la lingvon en la kongresoj de F.M. por ke iom post iom la neceso por traduko fariĝos superflua.

Veteranoj


Vendrede la 6-an de Aŭgusto je la 20-a horo kolektiĝis antaŭ la kongresejo esperantistaj veteranoj. Kunvenis: Paul Nylén (1892); P. H. Lewis (1902); A. Mittey, Carl Ohlsson (1904); Chas. P. Cocks, Oscar Bünemann (1905); Rosa Bye, André Rémond, Fredrik Skog, Nannie Asplund, Vilho Setälä (1906); Margarethe Noll, Jane Baird, K. Bugge-Paulsen, O. Brochmann-Sletteröd (1907).

La veteranoj poste promenis al la liberaera kunveno de TJO en la Balta Parko kaj tie S-ro Rémond, el Parizo, transdonis per kelkaj vortoj la saluton de la veteranoj al la junuloj.

C. Ohlsson.

TRA LA LIBRARO

*=akireblaj ĉe U.E.A.



***Ĉe la Sanktaj Akvoj** de J. Ĉ. Heer. El la germana tradukis A. Bader, P. le Brun, J. Schmid. Dua partio. 136 p., 16×23 cm. Svisa Esperanto-Societo, Bern, 1948. 4ŝ. 6p. broŝurita, afranko 3p.

Ĉi tiu volumo kompletigas verkon, kies unuan parton mi recenzis en *Esperanto* de Oktobro 1947, kaj ĉio, kion mi tie skribis pri la unua volumo, validas ankaŭ pri la dua, kiu cetere estas pli longa je duono. La tuta romano estas inda reprezentanto de la germana literatura antaŭ la esperantista legantaro, kiu ekster la paĝoj de *Svisa Antologio* havis ĝis nun nur malmulte da okazoj konatiĝi kun tiu kulturo.

En *Ĉe la Sanktaj Akvoj* malvolviĝas streĉe interesa historio pri svisa alpvilaĝo St. Peter (sed kial ne *Sankta Petro*?). Tra ĝi fadenas la senĉesa konflikto sur diversaj kampoj inter du vidpunktoj—tiu de la malnovaj tradicioj de izolita montara regiono, kaj tiu de la urbecaj ideoj pri la moderna tekniko kaj la materia progreso. Tra la tuta romano elstaras la figuro de la komunuma prezidanto, la 'Prezi', maltrankviliga sed respektelvoka homo, kaj en la dua volumo liaj rilatoj kun lia filino kaj ties amanto Ĵozi Blatter formas la ĉefan parton de la rakonto.

La flua kaj vervaj stilo de la traduko agrabligas la legadon. En verko kies lingvaĵo estas plejofte klasika laŭ maniero, estas interese rimarki tiajn modernajn formojn, kiaj *fojni*, *pugni* kaj *eĉ aperti*. *Edziĝebla* (63) kaj *degenerita* (70) estas supozeble eraroj presistaj, kaj ne gramatikaj; ankaŭ aliloke troviĝas kelkaj preseraroj. *Senharkapa* (100) estas vorto evitinda kaj nenecesa, ĉar ekzistas jam la pli simpla *kalva*. *Sendetruĝebla* (111) devus esti *nedetruĝebla*. *Sennutrado* (8) estas komprenebla, sed la logikeco de ĝia formado estas dubinda. Ĉu estas necese uzi la vorton *lezi* (kontrakton)? Certe *rompi* egalsignifas kaj estas pli taŭga, ĉar ĝenerale konata.

Alec Venture

***Skizoj Pri Nederlando** de Karel Ĉapek. Trad. G. J. Degenkamp el la ĉeĥa. Eld. Libroservo F.L.E., Amsterdam. 19.4×12 cm. 96 paĝoj. Broŝ. 3ŝ. 6p., afranko 3p.

La impresoj kaj observoj de fremda vizitanto ne ĉiam fidele redonas la veran karakteron de lando aŭ popolo. En la daŭro de kelktaga, eĉ kelkmonata restado, ne eblas atingi la koron de popolo kaj koni ĝiajn kutimojn, morojn kaj instituciojn. Neeblas, almenaŭ por la granda plimulto de homoj. De tempo al tempo tamen

aperas sur la literatura kampo verko de tia geniulo, kia per preskaŭ nehoma kompetento ne nur vidas kiel tuton sed kapablas kapti kaj kristaligi kalejdoskope la multifacetan vivon de popolo, kaj per trafe elektitaj vortoj kaj fraz-konstruoj redonas al ni la spiriton kaj karakteron de popolo. Tia estas *Skizoj*. La Nederlandanoj povas esti kontentaj, ke tiel simpatia kaj klarvida homo, kiel Ĉapek, decidis surpaperigi siajn impresojn, ĉar la rezulto estas ne nur fidinda bildo, sed distra, instrua, amuza kaj ĉarma verko.

Krom en la lasta triono de la libro, preskaŭ ĉiun paĝon ornamas desegno aŭ desegnoj faritaj de la aŭtoro mem, kaj estas malfacile juĝi, ĉu per la plumo aŭ per la krajono Ĉapek plej ĉarmas nin. Kvankam unu kompletigas la alian reciproke, ĉiu individue atingas la plej altan artan esprimon. La desegnoj iafoje havas la karakteron de karikturo, kaj tio per sia speciala eco prezenti per iometa troigo pli veran impreson ol fakta bildo, reliefigas antaŭ niaj okuloj ĝuste tiujn trajtojn de la popolo kaj lando, kiuj estas tipaj.

La traduko staras preskaŭ ekster kritiko, kaj G. J. Degenkamp ne devas kvazau pardonpeti, ke li tradukis el lingvo neĝepatra—malgraŭ la nesekvinda principo—sed rajtas fieri pri la rezulto. *Skizoj* estas vere riĉa kontribuo al nia literaturo, kaj la du-tri lingvaj eroj karakterizaj de la "amsterdama skolo" neniel deprenas de tiu opinio. Mi senrezerve rekomendas ĝin. Kiu jam vidis Nederlandon, akiru ĉi tiun daŭran memorigilon de lando kaj popolo ĉarmaj, gastamaj, interesaj. Kiu ne vidis Nederlandon, aĉetu ĝin kaj ekkonsciu pri sia malriĉo!

M.S.

La Milo: eld. I.A.P.K., Didcot, Berks., Anglujo. 32p., prezo 1 ŝilingo.

Sub tiu nomo aperis speciala numero de la *Internacia Poŝtmarka Revuo*, oficiala organo de Internacia Asocio de Poŝtmark-Kolektantoj. Ĝi tamen meritas specialan mencion pro diversaj kaŭzoj. Ĉi tiu numero festas la fakton, ke tiu Asocio—nur 2-jaraĝa—posedas mil membrojn. Tio estas rimarkinda kaj pensiga konstato. Tute aparte de tio, la numero mem estas altvalora kaj bela produktaĵo. Kun tut-Esperanta teksto, en modela lingvo, kaj kun enhavo treege interesa ne nur por la filatelisto, sed por la ĝenerala publiko, ĝi ja meritas aĉeton, kiel individua eldonaĵo. Sur la 32 paĝoj da artpapero troviĝas artikoloj *Filatela Promeno tra Parizo*, *La Konsilantaro de Trent*, *Filatelo kaj Esperanto*, *Internaciaj Poŝtmarkoj*, *Reĝoj en Ekzilo*, kun ilustraĵoj, kiuj tuj kaptas la intereson kaj estas valoraj kontribuoj al filatela literaturo. La mallonga artikolo *Pri verkado de artikoloj* enhavas konsilojn valorajn por ĉiu, kiu pensas pri kontribuado al gazetoj. Tre rekomendinda.

M.S.

Sinopse Estatística do Brasil (Statistika resumo pri Brazilo) 1946. Eld. Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística.

Ĉi tiu grandformata verko el 276 paĝoj estas nekalkuleble grava kontribuo al nia oficiala literaturo. Ĝi ne estas verko por la ĝenerala leganto, sed por la specialisto. Ĉi tie la ŝtatl-federacio Brazilo dokumentas sian laboron, sian popolon, sian ekonomion, sian staton. Per mirinda sistemo de statistiko eblas kontroli kiun ajn fazon de Brazilo vivo kaj taksu ĝian rolon en la ĝenerala bildo pri ĉi tiu moderna, progrese elvolvinta nacio. La ĉefa intereso por ni supozeble estas la uzo de Esperanto flanke de la Brazilo kaj Angla lingvoj, kaj la deklaro (en la tri lingvoj) ke . . . *Ĝi ankaŭ esprimas la deziron, ke la iniciato de Brazilo, subskribita en 1908 de Bulhoes Carvalho—la "Fondinto de la Brazilo Ĝenerala Statistiko"—kaj nun konfirmita de la Nacia Konsilantaro de Statistiko, koncerne la uzadon de la Neŭtrala Idiomio kiel ilo por internacia komunikiĝo, indu la koran solidarecon de ĉiuj Nacioj en la Mondo.*

Eble estas praktike optimisme atendi, ke la eventuala enkonduko de Esperanto efektiviĝos ne per multaj flagoj aŭ demonstracioj, sed iom post iom per tia netruda, iom modesta, sed racia kaj utila aplikado flanke de indiĝena lingvo, kaj la universala Angla, ĝis fine oni konstatos la superflumon de la ceteraj kaj uzos nur la komunan. Ĉi tiu verko devus esti en la manoj de ĉiu fakta propagandisto ĉe oficialaj instancoj.

M.S.

La grava entrepreno *Deutsches Reisebüro* nun inkluzivas Esperanton inter la uzataj lingvoj. Turistoj bonvolu noti tion. Informoj pri vojaĝoj en Germanujo ĉe: *Deutsches Reisebüro GBMH*, Gutleutstrasse Nr. 40, FRANKFURT/Main, Germanujo.

Ricevitaj: **Poŝtkarto pri paco** kun sambilda pacpoŝtmarko kaj poŝtstampo de la ĵusokazinta I-a Danubvala Esperanto-Konferenco: prezo kun afranko: 3 rpk. ĉe Esp. Kultur-Servo, Budapeŝto II, Jolsva u.4.

Skolta Bulteno de Skolta Grupo de Societo Misr en Egiptujo, kun artikoloj pri Esperanto.

Revista do Globo el Porto Alegre Brazilo kun 3-paĝa ilustrita artikolo pri Esperanto.

Zamenhof, iniciador del esperanto. A. López Luna, Ediciones Vertiente, Casilla Correo 2507, Buenos Aires, Argentino.—15×21 cm. 176 paĝ.—Prezo: 5 pesoj.

A. López Luna, konata aŭtoro de hispanlingvaj romanigitaj biografioj, kiaj *Don Mamerto Ordóñez*, *Cayetano Santander* kaj *El Gaucho Smith*,

nun romanigis ankaŭ la biografion de la kreinto de Esperanto, sub la titolo *Zamenhof, la iniciatinto de la lingvo Esperanto*, same en hispana lingvo.

Samideano López Luna bone konas la historion de nia movado kaj, kvankam li ne tion diras, evidentiĝas el la legado, ke li funde profitis ĉiujn ĝisnunajn aperintajn informojn, kiaj *Originala Verkaro*, *Enciklopedio de Esperanto*, verkoj de Privat kaj Drezen, k.t.p. La libro trafe respegulas la esperantoestigan etoson, kaj la vervon de la rakontisto kelkloke forte tuŝas la leganton, ĉefe kiam temas pri la unuaj sukcesetoj post la elpaŝo de la *Unua Libro*, aŭ kiam li priskribas la Unuan Universalan Kongreson. La personon de Beaufront, kiun López Luna nomas "*Granda Inkvizitoro de nia movado*," reliefigas mallumaj, drastaj peniktuŝoj.

Hispanajn legantojn eble ŝokas la multeco da argentinaj dirmanieroj, kiuj tintas obtuze en iliaj lingvaj kutimoj. Pro tio, la verko eble malgajnas iom ĉe hispanlingvuloj ekster Argentino, kie argentinaj idiomaĵoj estas nekutimaj.

Certe oni povas diri, ke tiu libro estas unu el la plej efikaj ĝisnunaj kontribuantoj al la kono kaj ŝato de Esperanto kaj de ĝia iniciatinto Zamenhof, en hispanlingvaj landoj. Tion mi asertas, ĉar la libron verkis homo kun poezia sento. Kaj poezio, eĉ dum nia epoko, plej vibrigas homan sentimenton.

Ni sincere gratulu la aŭtoron kaj ne laste la eldoniston, ĉar la libro estas tre plaĉe, eĉ lukse eldonita, tipografie bela, zorge korektita. La Zamenhofa bildo, kiu ormanas la kovrilon, estas iom diferenca de la kutimaj, sed tio ja estas malgravaĵo. Ŝajne en Argentino Esperanto havas esperige belan estonton.

J. Régulo Pérez.
Kanariaj Insuloj

Esperanto: lernolibro de Th. Kilian. Eldonis Pokorný a spol., Brno. Havebla ĉe EAĈSR, Praha, Ĉeĥoslovakujo; prezo 39 Kčs. 112p.

Ĉi tiu lernolibro, kiu aperas nun en sesa eldono, jam atingis eldonkvanton de 20 mil. Tio mem atestas pri la popularo kaj sukceso de la verko. Notinda fakto pri la verko estas, ke de p. 50 ĝis 84 troviĝas modelaj tekstoj en formo de rakontoj el diversaj mondpartoj. La tekstoj estas allogaj interesaj kaj formas altvaloran suplementon al la gramatika parto. Preso kaj papero tre bonaj.

Sovaĝaj bestoj de Afriko: tekstaro de filmstrio 143/7 de la Esperanto Film-Grupo en Bergen-Op-Zoom, prezo (nur por tekstaro) 13ŝ. 8p. Tre interesa kaj detala priskribo pri la animalio de la Afrika kontinento. Lingvo modela.

LA MIRINFANO

I.

Patrino : Infanetoj, mi devas eliri momente por komisionoj kaj lasi vin solaj hejme.

Johano, 6-jara : Vivu !

Manjo, 2-jara : Vu vu !

Patrino : Sed intertempe vi devas esti tre bonkondutaj.

Johano : Jes, bonkonduta.

Manjo : Bombombona.

Patrino (metas sur la tablo du pomojn) : Jen vi havos por manĝi.

Johano : Kio ili estas ? Ĉu rondaj karotoj ?

Manjo : Mondaj kalotoj.

Patrino : Pomoj ili estas. Bonaj fruktoj. Tiajn la homoj manĝis, kiam vi ankoraŭ ne estis. La Jul-koboldo sendis ilin el Svedujo.

Johano : Hej, ni manĝu !

Manjo : Mam, mam.

Patrinoj : Paciencon, infanoj. Vidu, unu pomo estas granda. La alia estas malgranda. Mi divenas, kiun el ili vi preferus. Sed nun, Johano, memoru kion mi instruis, por ke vi estu bona knabo. Estas necese esti cedema al la etuloj kaj ne ciam pensi nur pri si. Nun, se vi volas ĝojigi min kaj vin mem kaj Manjon, post mia foriro vi lasos la fratineton libere elekti, kiun el la pomoj ŝi volas preni. Ĉu vi promesas tion ?

Johano : Jes, panjo.

Manjo : Es, es.

II.

Patrino (revenas) : Kion mi vidas, Johano ! Vi ja manĝas la grandan pomon ! Kaj kie estas la malgranda ?

Manjo : Manjo mam mam.

Patrino : Johano, ĉu vi lasis Manjon elekti ?

Johano : Jes, panjo.

Patrino : Kaj ĉu Manjo libervole elektis la malgrandan pomon ?

Johano : Jes, panjo.

Patrino : Ĉu vere ? Kiel . . .

Johano : Mi diris al Manjo, elektu kion vi volas : aŭ la malgrandan pomon aŭ nenion. Kaj ŝi elektis la malgrandan pomon.

Patrino : Ho, ve . . .

Patro (eniras) : Nu, kio okazis ?

Patrino (rakontas ĉion al patro).

Patro (viŝas la okulojn).

Patrino : Tamen la afero ne povas tiom aflikti vin !

Patro : Mi ja ploras pro ĝojo ! Johano estas vera mirinfano ! Mirinfano ! Nur ses-jara. Kaj tamen jam perfekta diplomato !

Manjo : Mato, mato, mato.

NI PLIBONIGU NIAJN LIBROJN

Prave ni Esperantistoj rajtas fieri pri nia literaturo. Ni posedas kelkajn milojn da bonaj verkoj, kaj tradukitaj kaj originalaj, kiuj plejparte havas altan literaturan valoron. Do pri la enhavo de niaj libroj oni ne povas plendi.

Pri du aferoj mi tamen volas diskuti. Unue, temas pri la apero de centoj da tiel nomitaj verkoj, kiuj konsistas el 36, 48 aŭ 100 paĝoj. Ĉu tiujn eldonaĵojn oni povas nomi libroj ? Tute ne. Ili kutime havas malfortan paperan kovrilon, kiu baldaŭ disŝiriĝas kaj lasas onin kun malfirmaj paĝoj aŭ kun paĝoj kiuj tute elfalis. Oni eĉ timas malfermi iujn librojn pro timo, ke ili disfalos. Nur kelkaj eldonaĵoj havas sufiĉe fortan broŝuritan bindon, sed ili estas tiom malgrandaj laŭ amplekso, ke oni apenaŭ kuraĝas doni ilin al ne-esperantisto. Oni priridus nin.

Mi do volus fair proponon, ke oni alprenu devizon : *minimume cent paĝoj !* Necesas tempo, laboro kaj papero por aperigi libretojn kaj ŝajnas al mi, ke oni povus pli profite doni tion por produkto de taŭgaj verkoj kun pli granda amplekso, verkoj, kiujn oni povus enmanigi al kiu ajn, sen honto kaj diri : jen tio estas Esperanta libro.

Due, koncerne eldonaĵojn, kiuj estas gravaj verkoj, sed kiuj aperas broŝurite. Nunmomente mi pensas pri libroj, kiaj *Fine Mi Komprenas la Radion*, *Arthistorio*, *Rigardu la Teron* k.s. La binditaj ekzempleroj jam delonge elĉerpiĝis ; ni devas esti kontentaj per la broŝuritaj. Kaj jen la sama problemo. Ĉu la papera bindo estas kontentiga ? Denove ne. Oni devas tre zorge manumi la librojn por ke la paĝoj ne elfalu. Estas tiom pli malbone, ĉar ili estas bonegaj verkoj kiuj valoros dum jaroj kaj kies intereso ne forpasas post unu tralego, kiel estas kutime ĉe romanoj.

Kion fari ? La respondo estas simpla : bindi la elstarajn librojn, kaj se montriĝas necesa, fari kelkajn ekzemplerojn broŝuritaj, sed ili estu forte broŝuritaj. Resume : ni ne malŝparu nian tempon kaj nian monon ĉe libretoj el nur kelkdek paĝoj. Precipe en Usono ni bezonas bonajn librojn. La Usona publiko kutimiĝis al bonaj libroj kaj estas nebona propagando montri al ĝi ian ajn broŝuron. For la libretojn kaj fuŝeldonaĵojn ! Pli bone posedi dudek verajn librojn ol cent libretojn kiuj estas nemontrindaj al ne-esperantista publiko. Literaturon ni posedu en la vera senco de la vorto.

STRANGA NOVAJO ĈE LA TERKULTURO

Tial ke la kulturo de la tero estas inter la plej malnovaj artoj de la homoj, oni povus supozi, ke—almenaŭ rilate bazajn principojn—nenio nova estas eltrovebla. Dum jarmiloj la homoj fosis la teron, sterkis ĝin kaj observis difinitajn principojn pri la prilaboro de grundo prepare al semado. Oni tial kun iom da konsterno—se oni fakte pripensas tion, sed ne forĵetas la aferon kiel nekredeblaĵon—ekscias, ke ekzistas homoj, kiuj sukcese spitis dum jaroj la principojn de fosado de grundo. Oni rajtas demandi, ĉu la multaj generacioj de terkulturistoj fakte malŝparis siajn tempon kaj energion fosante sian teron, turnante la bulojn al la sanigaj influoj de suno, vento kaj frosto?

Nu, minimume du homoj respondas, ke jes! Unu estas iu S-ro A. Guest, eksministro en Barnsley en la nordangla graflando Yorkshire. En la ĉi-jara Reĝa Ekspozicio (la plej grava ekspozicio pri bestbredado, agrikulturo kaj agronomio en Britujo), tiu sinjoro ekspoziciis (sub aŭspicoj de la Grunda Asocio) terpecon en kiu flanke-ĉe-flanke kreskis diversaj legomoj kaj plantaĵoj en fosita kaj nefosita bedoj respektive, kaj la kreskaĵoj en la nefositaj bedoj multe kaj ĉiel superis la kreskaĵojn samspecajn en la fositaj bedoj!

Ke tio ne estis nura hazardo subtenas la fakto, ke S-ro Guest praktikas tiun sistemon jam de tri jaroj en la propra ĝardeno kaj kun la plej kontentigaj rezultoj.

La pioniro de tiu movado tamen estas S-ro F. C. King, ĉefĝardenisto ĉe ĝardenaro en graflando Westmoreland, kiu praktikis la nefosadon dum 30 jaroj. S-ro King estas eminenta kaj konata ĝardenfakano, kaj ĉiu povas per propraj okuloj konstati la surprizajn rezultojn de liaj metodoj.

En la ekspozicio troviĝis pizoj, faboj, terpomoj, brasikoj, laktukoj, betoj kaj diversaj “radik”-legomoj. Estas rimarkinde, ke precipe tiuj lastaj, kiuj laŭsupoze ne povus bone prosperi en nefosita grundo, estis elstare superaj kompare kun tiuj en la fosita terstrio.

La sistemo de *nefosado* konsistas simple en semado, ĉe nefosita grundo, en 5-centimetran tavolon de organika *kompoŝto* (miksaĵo el grundo, putrintaj vegetaĵoj k.s. kiu fariĝis sterko). S-ro King uzas krome multe da seg-polvo (lignopolvo) por “sufoki la kreskaĵaĉojn”, sed tiun lignopolvon li nepre ne miksas kun la grundo. Ĝi estas nur *kovra* tavolo. La uzo de tia polvo cetere ne estas absolute necesa, kaj bonegaj rezultoj estas atingitaj sen ĝi. S-ro Guest eĉ

fidas je la kompoŝt-tavolo por sufoki la malgrandajn kreskaĵaĉojn, kaj la longajn li elŝiras permane. Ili iafoje rulpremas la kompoŝt-tavolon post prisemo.

La baza principo de la teorio (cetere ne science pruvita) estas, ke la fosado, la renverso de grundo, perfortas la naturan ordon.

La praktiko tamen parolu pro si mem. La faboj en la fosita strio de tero estis frue atakataj de afidoj kaj oni devis jam frue aspergi ilin por haltigi ties malbonajn efikojn; sed la faboj sur la nefosita peco estis tute ne tuŝitaj de afidoj! Ĉe la brasikoj de la fosita strio la folioj estis truitaj de raŭpoj. Neniu raŭpo manĝis la foliojn en la nefosita terpeco! Klarigi, kial raŭpoj—kiuj supozeble alvenis aere, manĝis la brasikojn en unu parcelo sed ne en najbara, estas neeble. Tamen S-ro King antaŭmetas teorion, ke la plimulto de malamikoj de plantoj kaj kreskaĵoj en la ĝardeno estas flugilhavaj kaj ke fosita grundo altiras la atenton de fluginsektoj pli ol netuŝita tero, kaj ili tien pli volonte demetas siajn ovojn. Kaj ĝuste en Aprilo kaj Majo, kiam la ĝardenisto plej fervoras pri preparado de la grundo, ili demetas siajn ovojn!

S-ro King publikigis siajn teoriojn en angla-lingva verko (nun preskaŭ neakirebla!) kun titolo *Ĉu la fosado efektive estas necesa?* kaj unu rezulto estos, ĉu la teorio estas ĝusta aŭ ne, ke multaj ĝardenistoj ĝenerale, kaj fakanoj speciale, volos eksperimenti per siaj terpecoj por konstati, ĉu ili povos forigi el sia kulturprogramo ĝuste tiun parton, kiu por la plimulto estas tre volonte rezigninda, la fosado.

Mason Stuttard

LA LINSARKISTINO

Melodio de Erkki Melartin

Portos aliaj la tolan ĉemizon,
mi la linon sarkas,
distras aliajn mia ĝojado,
larmon neniu rimarkas.

Nun mi rigardas al sunosubiro
kaj belan or-ruĝon vidas.
iam mi kredis kion mi esperis,
nun mi plu ne fidas.

Nubo nur nubo en ĉia purpuro
kian ĝi povas pretendi.
Trompas espero kun ĉia turturo,
vane feliĉon atendi.

*Vortoj de Otto Manninen,
trad. Vilho Setälä.*

ANGULO DE LA PROPAGANDISTO

31. La "nova propagandrimedo" de la Luzern-aj samideanoj (vidu: maja numero, 64 paĝo) estas imitinda. Ili disdonis informilojn kun nacilingvaj klarigoj pri la celoj de Esperanto al ĉiuj kuracistoj en la urbo, por ke ili troviĝu en la atendejoj, kie tre multaj homoj ilin legos.

32. Ni devas labori laŭ la menciita metodo, sed ne devas ankaŭ kompletigi ĝin. Ĉiu ejo kie pluraj homoj ofte atendadas, taŭgas por la menciita propagandmaniero: Stacidomoj, havenkaj flughavenatendejoj, bankoj, sanigejoj, atendejoj de advokatoj kaj oficejoj k.t.p. Krome la veturiloj (vagonaroj, aŭtobusoj, tramoj, ŝipoj kaj flugmaŝinoj) en kiuj oni pasigas longan tempon, kaj ankaŭ hoteloj, kafejoj k.t.p.

33. La presaĵo mem devas esti interesa kaj bela, se eblas: ilustrita. Se ne, la homoj ne legos ĝin kaj la mastro de la ejo forĵetos ĝin, anstataŭ meti sur la tablon. Niaj propagandistoj klopodu akiri tiajn konvenajn presaĵojn. Se ili mankas, estas grava tasko de la landa E. asocio presigi tian nacilingvan propagandkajeron. Dependas de la financaj rimedoj de la asocio, ĉu oni - malmultakoste - disvendas, aŭ senpage disdonas la verkon.

34. Se oni enpresigas ankaŭ pagatajn anoncojn de firmaoj, tiumaniere oni povas—parte aŭ tute—kovri la kostojn de la eldono.

35. Ni petas niajn samideanojn, precipe la FDP-ojn, ke ili bonvolu informi nin pri la spertoj kiujn ili akiros dum la menciita laboro.

Semu atente

Ni estas semantoj de l'bono—malbono;
Disĵetas ni semojn dum ĉiu sezono
La semojn de l'vorto—de l'volo kaj ago—
En propran la koron—tagon post tago—
En korojn de l'homoj, kun ni vivantaj—
En korojn d'aliaj—kun ni migrantaj,
—Kaj tion ni semas sur nia tero—
Ĉiam ĝi kreskos—por ben' aŭ sufero!
Do—semu atente!

*Originalo de
H. Mansfeld*

* * *

Por ĉiu estinta horo
unu memoro—
Por ĉiu estanta horo
unu feliĉo—
Por ĉiu estonta horo
unu espero.

*Maria Letizia
di Savoia-Aosta*

34-a Universala Kongreso de Esperanto, Bournemouth, Anglujo, 6–13 Aŭgusto, 1949

Dua Informilo

Limdato: Notu la jenan gravan informon pri aliĝoj al la Kongreso!

1. Ni akceptos kongresaliĝojn nur ĝis la 1-a de Julio, 1949.
2. Pro la neeblo akiri pli grandajn kunvenejojn, ni devas limigi la nombron de gekongresanoj al maksimume 2,000, el kiuj ne pli ol duono estu Britoj.

Provizora Programo: Jen malneto de provizora programo de la Kongreso, sed definitivan programon ni povos starigi nur post du-tri monatoj:

Sabaton

ptm.: Kunsido de UEA-Estraro kaj LKK

vespere: Interkonatiĝa vespero

Dimanĉon

matene: Oficiala malfermo

ptm.: Diservoj

17.30: UEA-Estraro

20.00: Malfermo de Somera Universitato

Lundon

10.00: Unua Laborkunsido

14.30: Fakaj Kunsidoj

15.00: UEA-Komitato

20.00: Teatraĵo kaj Som. Univ. (duono de la anoj al ĉiu)

Mardon

10.00: Dua Laborkunsido

14.30: Fakaj kunsidoj

14.30: UEA-Komitato

20.00: Kiel Lunde vespere, sed inverse

Merkredon

Ekskursoj

vespere: Libera, kaj Som. Univ.

Ĵaŭdon

10.00: Tria Laborkunsido

14.30: UEA-Komitato

14.30: Fakaj Kunsidoj

20.00: Balo

Vendredon

10.00: Somera Universitato

14.30: Fakaj Kunsidoj

20.00: Muzika prezento (Urba Orkestro)

Sabaton

matene: Ferma Kunsido

Aliĝoj: Ĝis 22-a Septembro aliĝis 213 personoj el 20 landoj laŭ la jena statistiko:

Argentino 1, Aŭstralio 1, Belgujo 3, Brazilo 1, Britujo 134, Bulgarujo 2, Ĉeĥoslovakujo 4, Danujo 2, Finnulo 5, Francujo 8, Hungarujo 1, Italujo 4, Jugoslavujo 3, Nederlando 5, Norvegujo 6, Polujo 3, Portugalujo 1, Svedujo 22, Svisujo 4, Usono 3.

Adreso por leteroj: 34-a Universala Kongreso de Esperanto, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo.

LA PETSKRIBO

Landoj

Germanujo ..	5,033,560	Hungarujo ..	6,160
Ĉeĥoslovakujo ..	1,032,936	Urugvajo ..	4,704
Nederlando ..	547,118	Portugalujo ..	3,562
Norvegujo ..	490,382	Aŭstralio ..	3,370
Brazilo ..	169,446	Novzelando ..	2,540
Aŭstrujo ..	113,333	Svisujo ..	2,476
Francujo ..	95,809	Egiptujo ..	2,299
Svedujo ..	46,380	Grekujo ..	1,513
Belgujo ..	29,823	Maroko ..	1,330
Islando ..	28,348	Palestino ..	531
Britujo ..	27,912	Irlando ..	463
Bulgarujo ..	21,992	Kanado ..	402
Jugoslavujo ..	14,138	Sudafriko ..	295
Italujo ..	13,759	Hispanujo ..	276
Polujo ..	9,721	Hindujo ..	253
Danujo ..	9,010	Ceteraj lokoj ..	773
Usono ..	8,531		
Finnujo ..	6,390	sumo ..	7,735,783
Argentino ..	6,248		

Okupoj

Artistoj ..	2,138	Navigaciistoj ..	1,145
Delegitoj komunumaj	521	Parlamentanoj ..	258
Dentistoj ..	585	Policistoj ..	2,374
Desegnistoj ..	2,163	Presistoj ..	3,322
Dommastrinoj ..	45,880	P.T.T.-istoj ..	25,043
Edukaj aŭtoritatuloj	1,171	Religiistoj ..	1,545
Elektristoj ..	3,100	Sciencistoj ..	1,214
Farmaciistoj ..	1,337	Sindikatĉefoj ..	466
Farmistoj ..	10,685	Soldatoj ..	3,378
Hotelistoj ..	1,772	Studentoj ..	33,805
Inĝenieroj ..	14,001	Ŝoforoj ..	2,383
Instruistoj ..	33,710	Ŝtatoficistoj ..	33,094
Juristoj ..	1,791	Teksistoj ..	1,385
Ĵurnalistoj ..	1,214	Transportistoj ..	382,990
Komercistoj ..	59,713	Urboficistoj ..	3,770
Konstruistoj ..	6,493	Vendistoj ..	9,276
Kuracistoj ..	4,533	Vestistoj ..	6,299
Laboristoj ..	31,278	Diversaj ..	6,977,317
Lingvistoj ..	1,538		
Metiistoj diversaj	23,096	sumo ..	7,735,783

Kolektivoj ricevataj dum la pasinta monato : (mil aŭ pli)

Socialdemokratia Partio de Norda Hesse,	Germanujo	29.000
Socialdemokratia Partio de Orienta Westfalen,	Germanujo	31.500
Socialdemokratia Partio de Baden,	Germanujo	10.000
Socialdemokratia Partio de Pfalz,	Germanujo	27.580
Socialdemokratia Partio de Rejnlando,	Germanujo	15.000
		113.080

Sumo de ĉiuj kolektivoj 6.870.852 ĝis 2.9.1948

Baldaŭ alvenos la fino de la jaro kiam la petskriba kampajno finiĝos. Agu nun, por ke la fina rezulto estu inda kaj impona. Nepre ne forgesu ensendi ĝustatempe la kolektitajn subskribojn !

? 10,000,000 ?

ESPERANTO KAJ RADIO

Redaktas S-ro A. C. Oliver, 120, Herongate Road, Chorleywood, Rickmansworth, Anglujo, al kiu oni sendu senescepte ĉion pri tiu rubriko

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso

Ĉiutage	16.30-16.45	Praha. 1935m. kaj 31.41m. I.
	17.15-17.30	Paris. 41.21m. Radio-diffusion Francaise, Emissions espérantistes vers l'étranger, 118 Champs-Élysées, Paris 8.
	22.00-22.15	Praha. 49.92m. P.
Lundo	11.30-11.40	PRG2 (Brazilo). 104m. P.
	17.30-17.40	Wien II. 31m., 41m. kaj 228.6m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV.
	21.50-22.00	Praha. 470.2m. Prelegoj, intervjuoj, teatraj scenetoj, kantoj kaj informoj. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
	22.00-22.30	Ĉeĥoslovakujo. 269m. kaj 325m. Verda Stacio. Arto-programo (Nur la unuan London de la monato).
	23.30-23.35	Budapest I. 549.5m. I. Hungara Radio, Budapest VIII, Bródy Sándor u. 7.
Mardo	18.05-18.10	Bern. 25.61m. kaj 48.66m. P. de D-ro Baur. Schweizer Kurzwellendienst, Neungasse 28, Bern.
	18.50-19.00	Sofia. 32.09m. P. Radio Sofia.
	20.45-21.00	Hradec Králové. 238m. (Krom la unua mardo).
	21.00-21.10	Ostrava. 259m. Radiostacio Ostrava, Bráfova 5 (krom la unua mardo de la monato).
Merkredo	10.15-10.35	Paris. 431.7m. K.
	21.10-21.25	Warszawa III. 48.25m. I. Pola Radio, Warszawa, Koszykowa 8.
	23.30-23.35	Budapest I (kiel je lundo).
Ĵaŭdo	17.45-18.00	Hradec Králové. 280m. Vychod-očky vysilač, Hradec Králové, Ĉeĥoslovakujo.
	17.55-18.00	Bern. 25.61m. kaj 48.66m. P. de D-ro Privat.
	21.50-22.00	Praha. 470.2m. (kiel je lundo).
	21.00-21.10	Ostrava. 259m.
Vendredo	18.50-19.00	Sofia. 32.09m. P. Radio Sofia.
	23.30-23.35	Budapest I (kiel je lundo).
Sabato	12.00-12.15	München. 405m. kaj 48.70m. kaj Nürnberg 315.8m. K. (ĉiun duan sabaton). Radio München, Kulturabteilung Rundfunkplatz 1, München, Bayern, Germanujo

Klarigoj—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Ni petas informon pri necesaj aliigoj. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratulleterojn kaj informojn pri ricevo.

KUDRA KAJ TRIKA TERMINARO

-M. kaj V. Verda

9 pencoj aŭ 3 respondkuponoj

Mendu ĉe U.E.A.

ENIGMA KONKURSO N-ro 31

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 106 rue Général Lotz, Brussel-Uccle, Belgujo.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 28a konkurso : S-ro E. Riedel (Germ.) 123 p., S-ro A. Frolišek (Ĉeĥosl.) 121 p., S-ro P. E. Schwerin (Aŭstralio) 117p.

N-ro 67 : Krucvortenigmo

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
A												
B												
C												
D												
E												
F												
G												
H												
I												
K												
L												
M												

Horizontale :

- A. 1. Moderna kuracarto.
- B. 1. Certigi, ke io estas vera. 7. Necesa por pentristoj (r).
- C. 1. Nespertulo. 7. Apartigita (r).
- D. 1. Supera instruejo.
- E. 1. Havas neniun homon. 6. Libroformato.
- F. 1. Bruo malagrabla por preskaŭ ĉiu. 8. Speco de nukso (r).
- G. 1. Vasta maro. 7. Figuro el la ŝakludo.
- H. 1. Optika instrumento. 6. Tro indulgi ies dezirojn (r).
- I. 1. Forta inklino. 5. Vegetaĵo kun dika radiko. 9. Ne kontraŭstari.
- K. 1. Angla mezurunuo de longeco. 5. Ŝanĝarango de la literoj de vorto.
- L. 1. Speco de pasero (r). 7. Negativa (r). 9. Prepozicio.
- M. 1. Taksebla materialo (r). 4. Najloforma florburĝono uzata kiel spicaĵo.

Vertikale :

1. A. Plantofamilio.
2. A. Efekta ripeto de sama aŭ simila vokalo. I. Fiŝo, kiun multaj infanoj ne ŝatas.
3. A. La tuta mondo parolas pri ili (r). F. Espereble ĝi ne falos sur vian kapon (r).
4. A. Moviĝi. E. Tre ŝatata frukto. L. Nombro.
5. A. Participa finaĵo. C. Kampa blua floro. I. Purigi (r).
6. A. Montra pronomo. D. Ornamenta planto (r).
7. A. Katolika diocezo. I. Transformi felon en ledon.
8. A. Viro prefere estu tia. G. Peceto. K. Prefikso.
9. A. Ekstrema parto de konstruaĵo. D. Maldika etendaĵo de iu substance. K. Faldi la velojn (r).
10. A. Irigi rapide antaŭen (r). D. Ĉevaloj ŝatas tion. I. Multaj prefere faras tion en la maro.
11. B. Honora nomo. H. Tio, pri kio oni parolas.
12. A. Maniero skribi la vortojn. L. Konjunkcio.

N-ro 68. El la subaj 63 litergrupoj formu 21 naŭliterajn vortojn, kies unuaj literoj formas la frazon : Kia reganto, - tia servanto. La vortojn, kiuj komenciĝas per la samaj literoj, vi bonvolu meti en alfabetan vicordon.

aku - ala - ala - ape - arg - ast - atm - cim - cio
elo - eno - era - ere - eri - erk - erm - ero - esp
fio - gin - gra - gut - idi - iko - ila - ilo - int
iti - ivo - kod - kro - kot - nar - nco - nep - nk
nto - nto - nse - olu - omo - ori - oro - osf - oti
oti - pto - rev - riv - rko - ron - smo - smo - spe
tik - tra - tra - tub - ulo - ume - ver - zat - zip

Lerneja gazetaro

La Orientado-Centro de Lerneja Gazetaro en Montevideo organizas Konstantan Ekspozicion de Lerneja Gazetaro en ĉiuj lingvoj ; sekve ĝi havos universalan karakteron. Tiu ekspozicio traĵos la lernejojn en Urugvajo, kiel sugesta kaj stimula fonto por la disvastigo de la lerneja gazetaro.

Tiu ĉi Centro multe interesiĝas pri la akiro de informoj rilate la disvolviĝon de tiu aktiveco en ĉiuj landoj, kaj ĝi multe dankos la ĝentilecon de la personoj, kiuj bonvolos havigi al ĝi tiajn informojn aŭ ekzemplerojn de lerneja gazeto, aŭ ĝin interrilatigi kun ĉiulandaj personoj kaj institucioj, kiuj praktikas la lernejan gazetaron.

Aliparte, oni bone komprenos, kiom grava estos por la propagando de Esperanto en Urugvajo, la atingo de bonsukceso tiuokaze, per la praktika uzo de nia lingvo.

Adresu viajn korespondaĵojn al : *Centro Orientador del Periodismo Escolar*.—Calle Canelones, 1122.—MONTEVIDEO (Urugvajo).

ESPERANTISTA VIVO

Fianĉiĝo

Déguilly-Neuberg. Fianĉiĝis Jean Déguilly, franco nun en Anglujo, kun Mary Neuberg, nederlanda fraŭlino. Ni gratulas.

Niaj Mortintoj

Ni sciigis pri la forpaso de la jenaj samideanoj. Al iliaj familianoj ni esprimas nian profundan kondolencon.

Sinjoro H. A. Butterworth, Leeds, Anglujo, 13/5/48, 76 jaraĝa, instruisto kaj kasisto de la grupo en Rochdale.

Sinjoro L. Eliasson, Westcliff-on-Sea, Anglujo, je 24a Julio 1948.

Sinjoro Pastro Delta Evans, en Rhyl, Kimrujo. Poligloto kaj batalanto por kimra celado.

Sinjinorino E. Robertson, Wood Green, London, 84 jaraĝa, vidvino de Robert Robertson, agema samideano mortinta antaŭ nelonge.

Sinjinorino Rosen, edzino de Charles Rosen, estinta Estrarano de UEA, malnova esperantista paro, Julio 1948 en La Chaux-de-Fonds, Svislando.

Sinjinorino Afifa Salem, edzino de Mustafa Salem, Bahai esperantista en Alexandria, Egiptujo, Junio 1948, 30 jaraĝa.

Sinjoro Theodor Schneider-Erismann, honora membro de la grupo en St. Gallen, malnova amiko de UEA, 10/8/48, sekve de kor-apopleksio, 61 jaraĝa.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Herongate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 209

3an de Septembro 1948

ĈEFDELEGITO

Aŭstrujo

Ph. Mr. F. Höfert, Penzingerstr. 121, Wien XIV/89.

DELEGITOJ

Brazilo

Pôrto Alegre. FD (Arkitekturo) : E. Corrêa, Caixa postal 1597. Tel : 6460.

FD (Lingvoj) : W. Francisco Gonçalves, Escola Preparatória. Tel : 92091.

São Paulo. FD (Virinaj aferoj) : S-ino A. de Araujo Miniero, rua Coronel Gustavo Santiago 65.**Torquato Severo.** D : J. Corrêa Severo, Vila Torquato Severo, D. Pedrito, R. G. do Sul.

FD (Spiritismo) : La D.

Britujo

Luton. FD (Muziko) : T. Pendlebury, 280 Beechwood Road.

Finnlando

Laihia. D : Hugo Salokannel.

Germanujo

Bensheim. FD (Stenografio) : H. Friess, Annastrasse 8.**Hildesheim.** D : W. Wink, Kampstr. 10.

FD (Arkitekturo) : La D.

Konstanz. D : F. Bierhoff, Neugasse 37.**Reit im Winkl.** D : A. H. de Marich, Postfach 36, Haus 99, (13b) Reit im Winkl.

FD (Mondlingvoj) : La D.

Nederlando

Soest. FD (Kemio) : D-ro W. P. Roelofs, Kerkpad 53.

Norvegujo

Trondheim. FD (Kontraŭalkoholismo) : F. Torvik, Klostergt. 76a-IV.

Svedujo

Hälsingborg. FD (Turismo) : F-ino B. Adolfsson, Bergaliden 3. Tel : 16917.

Usono

LaFayette (Indiana). D : D-ro F. J. Belinfante, Dept. of Physics, Purdue University, West LaFayette. Tel : 8-5215.**Wilton** (New Hampshire). D : G. W. Bailey, Jr., R.F.D. Tel : 143-R3.

ŜANĜOJ

Brazilo

Recife. FD (Virinaj aferoj) : vakas.**Rio de Janeiro.** FD (Spiritismo) : vakas.**São Paulo.** FD (Teknika Desegnado) : nova adreso : rua Coronel Gustavo Santiago 65.

Britujo

Edgware. D : vakas.

Finnlando

Kyrö. D : vakas.

Jugoslavujo

Kamnik. D : vakas.**Kranj.** D : nova adreso : Prešernova 12.**Novi-Sad.** FD (Filatelo ; Ĵurnalismo) : nova adreso : Leningradska ul. 22.**Sevnica.** D : vakas.**Zagreb.** D kaj FD (Komerco) : adreso : Morovička 42, Zagreb-Dubrava.

Nederlando

Diemen. D kaj FD (Kemio) : vakas.

Norvegujo

Bergen. VD : F-ino A. J. Klyve, Nansenvei 35.**Fredrikstad.** D : nova adreso : Hassingveien 33-II.**Oslo.** VD : S. Brantsaeter, c/o Box 942.

FD (Kontraŭalkoholismo) : vakas.

Svedujo

Lulea. D kaj FD (Fervojoj) : vakas.**Trelleborg.** FD (Fervojoj) : vakas.

Usono

New York. FD (Medicino) : vakas.

HONORA MEMBRO

S-ro R. Rian, Trondheim, Norvegujo.

DUMVIVA MEMBRO

F-ino F. D. Priestman, Newport, Essex, Anglujo.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1948

328. D-ro L. Jepifanow, Gdynia, Polujo.

329. S-ro J. Toczyski, Gdynia, Polujo.

330. S-ro A. De Pazla, Polujo.

331. S-ro J. Mirowski, Celestynow, Polujo.

332. S-ro N. J. Nielsen, Thorshavn, Danujo.

333. D-ro J. A. Quiña González, Buenos Aires, Argentino.

334. S-ro J. R. Pfanner, Gandorhun, Sieraleono.

335. S-ro R. A. Flavell, Oyama, Kanado.

336. S-ro A. Hermansson, Uddevalla, Svedujo.

337. S-ro A. Carmo, Petropolis, Brazilo.

338. S-ro M. Jakupović, Zemun, Jugoslavujo.

DONACOJ. C. H. Briggs 24\$. 2p., H. A. Padley 5\$, J. Course (Royston) £5.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la 31a de Aŭgusto 1948, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Aŭgusto 1947 :

	1947	1948
Asociaj membroj ..	7003	8988
Individuaj membroj :		
MJ	1046	927
MA	5091	4394
MS	289	337
Patronoj ..	22	21
DM	149	171
HM	53	56
	6650	5906
	13653	14894

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario*

Averto pri poŝtaĵoj

El Hungarujo ni ricevis averton, kiu tamen validas pri ĉiuj landoj. Korespondantoj persistas enmeti leterojn en pakaĵojn signitajn *Presaj*. Tio estas kontraŭleĝa, kaj la malkovro kaŭzas, ke la ricevonto pagu punmonon ! En Hungarujo oni esploras presaĵpakaĵojn. Do . . . atentu !

NONI KAJ MANI

De JÓN SVENSSON

Esperanto-traduko de Paul van den Hövel

La verko rakontas pri la spertoj de du malgrandaj Islandaj knaboj, kiuj veturas per remboato kaj perdiĝas ie sur la vasta maro. Ĝi estas kredeble destinita por junuloj ; povas esti, ke en sia Esperanto-traduko NONI KAJ MANI taŭgas ankaŭ kiel facila legaĵo por plenaĝaj lernantoj finintaj elementan kurson.

Bele presita sur bonega papero. 160 paĝoj. Ilustrita.

Broŝurita 2ŝ. 6p., afranko 3p. (11 rpk.)

Bindita 3ŝ. 6p., afranko 3p. (15 rpk.)

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO

ekzistas 10 jarojn. Tiukaze aperis 16-p. ilustrita propaganda broŝuro, kiu enhavas detalajn informojn pri la estiĝo kaj disvolviĝo de T.J.O. kaj Denaska Esperantistaro, statuton de T.J.O., kaj liston de perantoj. Ĉiu, kiu vere interesiĝas pri la junular-laboro nepre mendu la broŝuron ĉe

TJO-CENTRO

West Graftdyk, Nederlando

Prezo : 5 pencoj aŭ 1 int. resp. kupono

R-CLUB Monda amikeco estas nia celo

Internacia klubo por interŝanĝo kaj korespondado. Membrolisto aperas kvaronjare. Pli ol 1000 membroj en ĉiuj landoj. Jara membrotizo : Usono 1 dolaro, Britujo kaj kolonioj 5 ŝil. aŭ samvaloro. Neuzitaj memoraĵaj aŭ flugpoŝtmarkoj, aŭ 12 rpk., aŭ British Postal Order ankaŭ akceptataj.

Direktoro :

Vilém Nesler, Box 25, Jičín, Ĉeĥoslovakujo

DENOVE HAVEBLA



ZAMENHOF- RADIKARO

EUGEN WÜSTER

kun derivaĵoj kaj fontindikoj

—

Prezo : 6 ŝil., afranko 3p.

—

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

POR VIA DISTRO

PREMIAJ ROMANETOJ

La libreto entenas 23 mallongajn rakontojn, kiuj estis premiataj en literatura konkurso. La romanetoj, tre diversaj en temo kaj stilo, estas originale verkitaj en Esperanto. Pro la interesa enhavo kaj bona lingvo la libro tre taŭgas kiel ekzerca legaĵo por kluboj, studrondoj, kaj perfektigaj kursoj.

La Praktiko, Marto 1948.

96 paĝoj, broŝurita, oportuna por la poŝo aŭ la mansaketo.

Prezo : 2ŝ. 6p., afranko 2p. (11 rpk. afrankite).

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

ALEKSIS KIVI

SEP FRATOJ

Klasika verko el la fora nordlando.

Ekkonu la animon de la finna popolo per ĉi tiu bela traduko en vigla, kolorplena lingvo.

Romano kun la tuta ĉarmo de popolkanto.

360 paĝoj.

Prezo : bindita 16 ŝil. 6p., broŝ. 13 ŝil., afranko 6p.

Eldonita de

ELDONO VILHO SETÄLÄ, HELSINKI.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo